



PILO-PRESS

Internacia
Infermserve

Vizitu la
Germanan
Esperanto-
Ekspozicion en
Augsburg 1976
=====

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 16/1976 - 15 aprilo 1976
Aperas ĉiusemajne

Pliaj salutoj por la Eŭropa Esperanto-Kongreso

Bonn (pp) - Helmut Rohde, federacia ministro por klerigo kaj scienco, sendis al la Germana Esperanto-Asocio sub la dato de 6.4.1976 jenan leteron:

"Por via skribaĵo kaj la en ĝi esprimita peto aliĝi al la honora komitato de via kongreso, mi tre kore dankas al vi.

El la Esperanto-Nachrichten-Dienst (END) N-ro 5/1976 de la 17-a de marto intertempe mi eksciis, ke krom la ĉefministro de la Lando Nordrejn-Vestfalia, sinjoro Heinz Kühn, du pliaj germanaj politikistoj, nome la kulturministro de la Lando Nordrejn-Vestfalia, sinjoro Jürgen Girgensohn, kaj la membro de la Germana Parlamento kaj de la Eŭropa Parlamento, sinjoro profesoro Dr. Fritz Burgbacher, sin deklaris pretaj, aliĝi al la honora komitato de la Eŭropa Esperanto-Kongreso paske 1976 en Eindhoven.

Mi sur tiu vojo volas transdoni mian saluton por via kongreso kaj per tio esprimi mian subtenon."

Kopion de la germanlingva original-letero ni publikigas sur paĝo 2 de ĉi tiu numero.

Cetere, la ministro de klerigo kaj scienco estas la kompetenta ministro por Esperanto-aferoj interne de la federacia registaro.

Ministro por eksteraj aferoj

Ankaŭ la ministro por eksteraj aferoj, sinjoro Genscher, transdonis al la Eŭropa Esperanto-Kongreso la plej bonajn dezirojn por sukcesa paso de la kongreso. En la letero de la 24-a de marto 1976, la estro de la kultura departemento de la ministerio por eksteraj aferoj krome informis, ke la ministro por eksteraj aferoj volonte sendos salutvorton okaze de la malfermo de la kongreso en Eindhoven kiel signon de la rekono de la Esperanto-strebadoj.

+++++

Opini-esprimo pri lingva problemo

München (pp) - Wilhelm Ebert, München, la prezidanto de la Bavara Asocio de Instruistoj kaj prezidanto de la Monda Asocio de Instruistoj, en letero de 19.10.75, kiu nur nun konatiĝis al ni, esprimis i.a. jenan opinion pri la lingva problemo:

"Ĝuste pro miaj multflankaj internaciaj kontaktoj mi ofte sentis la disigajn barojn de diversaj naciaj lingvoj. Kaj pro tio fariĝas tute komprenebla la deziro pri universala lingvo kiel ĝin prezentas Esperanto. La instalaĵoj por simultana tradukado nur estas tre supraĵa teknika helpilo de komunikado. Kion koncernas la anglan lingvon, oni ĝin certe ne povas nomi laŭ ĝia senco monda lingvo, kvankam la angla kaj la franca mondvaste prezentas komunikan bazon, se ankaŭ nur limigitan....."

La germana originalo de la letero de
federacia ministro Helmut Rohde

HELMUT ROHDE

BUNDESMINISTER
FÜR BILDUNG UND WISSENSCHAFT

53 BONN-BAD GODESBERG, den 6. 4. 1976

STRESEMANNSTR. 7
FERNRUF (02221) 572000

An den
Deutschen Esperanto-Bund e.V.
z.H. Herrn Hermann Heiß
Lohstraße 48

7602 Oberkirch

Sehr geehrter Herr Heiß!

Für Ihr Schreiben und die darin geäußerte Bitte, dem Ehrenkomitee
Ihres Kongresses beizutreten, danke ich Ihnen sehr herzlich.

Aus dem Esperanto-Nachrichten-Dienst (END) Nr. 5/1976 vom
17. März 1976 habe ich zwischenzeitlich erfahren, daß sich
außer dem Ministerpräsidenten des Landes Nordrhein-Westfalen,
Herr Heinz Kühn, zwei weitere deutsche Politiker, nämlich der
Kultusminister des Landes Nordrhein-Westfalen, Herr Jürgen
Girgensohn, und das Mitglied des Deutschen Bundestages und
des Europäischen Parlaments, Herr Professor Dr. Fritz Burgbacher,
bereit erklärt haben, dem Ehrenkomitee des Europäischen
Esperanto-Kongresses an Ostern 1976 in Eindhoven beizutreten.

Ich möchte auf diesem Wege meinen Gruß zu Ihrem Kongreß über-
mitteln und damit meiner Unterstützung Ausdruck verleihen.

Mit freundlichen Grüßen


(Helmut Rohde)

Aktoj de la Akademio

Rotterdam (pp) - Aperis la "Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto - No. 10" sub la titolo "Aktoj de la Akademio II, 1968 - 1974". Formato 15 x 23 cm, broŝ. 79 paĝoj, prezoj 10 n. gld.

Tiu volumo entenas la rezultojn de la laborado de la Akademio de Esperanto dum la jaroj de 1968 ĝis 1974. Ĝi konsistas el du partoj: la unua kun la oficialaj tekstoj, laŭstatute voĉdonitaj de la Akademio; la dua kun la neoficialaj tekstoj, ne formale submetitaj al formala voĉdono.

Haveblas ankoraŭ la unua volumo de Aktoj de la Akademio I, 1963 - 1967, aperinta en 1968. Ĝia prezo estas 5,- n.gld.

Deponejoj estas UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando, kaj SAT, Avenue Gambetta 67, Paris 20, Francio.

El la Akto II oni eksciās, ke la 15-an de februaro 1976 estis elektitaj kiel novaj akademianoj i.a.:

D-ro Werner Bormann, Hamburg, FRG
S-ro R. Eichholz, Mississauga, Ontario, Kanado
S-ro Reinhard Haupenthal, Dudweiler, FRG
S-ro A.J. Pettyn, Varsovio, Pollando

Manifesto de la Paco

Sub la supra titolo aperis, jam fine de 1975, "voko al rekonsciigo" de Rudolf Zimmer kaj K.O. Schmidt, en la Esperanto-traduko de Adolf Mosch.

La broŝuro, formato 12 x 19 cm, kun 59 paĝoj, estas ricevebla kontraŭ 6 internaciaj responduponoj ĉe Alfred-Richard Walther, Postfach 3649, D-7100 Heilbronn.

Pri Esperanta Bildvortaro

Jam en 1964 komenciĝis la laboroj por la eldono de la Esperanta Bildvortaro laŭ la germana originala eldono "Der große Duden - Bildwörterbuch der deutschen Sprache". La vortaro klarigas per 368 moderne desegnitaj bildtabuloj ĉ. 25 000 per bildoj klarigeb-lajn nociojn.

En la jaro 1975 estis pretaj jam 672 paĝoj de la Esperanta eldono. La lastajn paĝojn de la presprovaĵo la eldonisto intencas presi dum la jaro 1976. Supozeble la vortaro povos aperi en 1977.

Interesuloj jam nun povas ricevi la presprovaĵojn en formo de Slipara Vortaro. Estas la intenco, ankaŭ eldoni "Vortaristan Forumon" - en formo de Slipara Vortaro -, en kiu oni volas pli sisteme publikigi vortarajn opini-esprimojn.

Interesuloj turnu sin al Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Rd., Mississauga, Ont., Kanado, L5H 3N6.

Eŭropa Esperanto-Revuo

N-ro 2/1976 de Eŭropa Esperanto-Revuo eliros vendrede, la 23-an de aprilo.

Ĝi enhavas i.a.: primovadajn artikolojn, memorigan artikolon pri la mortinta Kolomano Kalocsay, alvokon de Bruno Vogelmann pri la EKI-Etikedservo, la rubrikojn Eŭropa Panoramo kaj Kulturo-literaturo, kiu denove prezentas tradukon de Kishon-satiraĵo "La Karuselo" kaj plian daŭrigon de "La aventuroj de Simplicius Simplicissimus".

La Gaja Forĝisto

estas la titolo de ĵus aperinta broŝuro kun ok gajigaj humorplenaj poemoj de Hermann Schmid kaj dek trafaj ilustraĵoj de Josef Maria Ipfelkofer.

Kion la aŭtoro intencas, li mem klarigas en sia alparolo al la "Kara leganto":

Kiam vi post streĉa taga laboro
disponas pri libera horo

vi certe ne ĉiam volas streĉi la menson
mi do havas por vi tre utilan penson

vi ĝuu vivan spicon puran
ne altnivelan sed humuran...

Kaj tiu "viva spico pura" ĉefe devenas el bavara medio, kaj do ne surprizas, ke unu el la poemoj titolas: "Inter la bavaroj".

Formato 14,5 x 21,2 cm, broŝ., 24 p., prezo ĉ. 3,90 GM

Libroservoj mendu ĉe Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f,
8901 Steppach, FRG.

Esperanto en Radio

Radio Bern: Kio estas BoLoSo? Kiu aŭskultis al la prelego de d-ro Arthur Baur, certe nun scias, ke temas pri la fervojo Bern-Lötschberg-Simplon, kiu ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ veturas sen deficito! Tamen oni nun decidis konstrui duan trakon por la 37 km, kiuj nur estas unutrakaj. La konstrukostoj estas 620 milionoj da frankoj.

Radio Varsovio: La dimanĉa Esperanto-Ekspreso aŭdigis la komunikon pri la 8-a Konsulta Renkontiĝo de la Esperanto-organizaĵoj en la socialismaj landoj, pri kiu Pilo-Press jam mallonge raportis. Certe tiaj regionaj renkontiĝoj de gvidaj instancoj de la Esperanto-movado estas utilaj. Estus nur dezirinde aŭdi pli konkretajn informojn pri la fakte faritaj decidoj kaj estontaj planoj. Ankaŭ la estraroj de la landaj Esperanto-movadoj en la okcidento, speciale en la eŭropaj landoj de la Naŭo, devus de tempo al tempo renkontiĝi por preparoli la paŝojn por enkonduko de Esperanto en la eŭropaj instancoj. - Interesa estis ankaŭ la intervjuo kun rusa esperantisto, el kiu ni eksciis interesajn detalojn el la laboro de la sovetaj esperantistoj. - La ĉiusemajna statistiko furoras ankoraŭ ĉiam en la leterkesto. Ĉi-foje alvenis 145 korespondaĵoj, dank' al 35 salutkartoj de renkontiĝo de hungara Esperanto-junularo.

Pekino: La sabata kaj vendreda elsendoj raportis detale pri la tumultoj en Pekino, pri kiuj oni povis legi en la naciaj gazetoj.

Radio Roma: Tiu stacio ankaŭ ĉi-foje estis malbone komprenebla. Ni nur sukcesis kapti frazarojn pri informoj rilate al la Esperanto-elsendoj de Radio Vatikana. Ŝajne oni nun komencis la uzadon de E.

Vieno: Tiu stacio ricevis en la pasinta semajno 15 alskribojn el 10 landoj. Ĉiam interesa estas la semajna komentario de d-ro Alfred Macher, el kiu ni mallonge citas: "La glora aŭstra printempo allogas nun tre multajn turistojn el eksterlando. Sed venis kaj venas ankaŭ tre distingitaj gastoj - certe ne por ĉefe ĝui nian printempon, sed unuavice por kontakti kun ni politike kaj ekonomie. Simile kiel la egipta prezidento Sadat, nun ankaŭ la portugala ĉefministro Azevedo esprimis la konvinkon, ke la aŭstra sistemo de evoluigo kaj de kunlaborado inter privata kaj ŝtata ekonomioj estas modeloĵo nepre imitindaĵo...."